aŭdinta tiun demandon pri ebla aŭtomobil-difekto! Kaj tion de eminenta Gĵimek'! Li tamen tuj rimarkis, ke mi nek dormas nek volas esti ĝenata en miaj prihienohundaj observadoj – kaj forveturis.

La kvina renkontiĝo: iam mi stimulis lin kaj lian bofilinon fari mallongdaŭran ekskurson. Ĉe malgranda ŝtonkovrita altaĵo mia landrovero ne plu funkciis: la startilo ŝajne suferis pro antaŭa nememvola "banado" dum transiro de rivera vadejo akvo(tro)plena. La starigo sur altaĵo estis bonŝanĉa, ĉar de tio eblas ruli la vehiklon post malstreĉa puŝado. "S-ro Gĵimek': Vi stiru, ni puŝu!" mi sugestis. Sed tion li ne volis. Li petis min, ke mi sidiĝu malantaŭ la stirilo – kaj la fama televidprofesoro kun sia bofilino ambaŭ puŝis. Sukcese puŝis.

La sesan fojon ni renkontiĝis antaŭ la "Nova Aruŝa Hotelo" en *Arusha* mem. Gĵimeko ne portis kravaton. Pro tio oni ne permesis al li, eniri la hotelan restoracion. (Tiom striktaj estis la reguloj en iama brita kolonio!). Mi ne plu memoras, kial mi hazarde kunhavis du kravatojn. Ĉiuokaze mi pruntedonis kravaton al li (kaj plue donacis al li masajajn batalŝildon kaj ĵetlancon). Dum posta diskuto mi menciis, ke mi tute ne kontraŭus – ja eĉ bonvenigus – ke masajotribanoj paŝtu siajn gregojn en Serengetio mem; ili ja iel estas parto de la Naturparko. Gĵimeko havis tute alian opinion. Nu, mi nuntempe ĝojas, kiam mi almenaŭ en la Ngorongoro-rezervejo vidas, ke masajoj rajtas konduki tien siajn hejmbestojn por trinkigi ilin.

Mi bone interrilatis kun Gĵimeko dum tiu ĉi tempo en Tanzanio, en Serengetio. Li tiam estis pli kolego ol ĉefo. La antaŭlastan fojon mi renkontis lin kiel "veran ĉefon" inter siaj dungitoj kaj bestoflegantoj en la Frankfurta Zooparko. Oni festis iun feston. Mi volis atentigi pri iu problemo en la naturprotekta regiono por la formortantaj *Atlas*-montaraj cervoj, sed ne ricevis aljuĝon. Gĵimek' havis aliajn interesojn. La lastan fojon ni hazarde renkontiĝis en la zoologia ĝardeno en Kolonjo. Neniu zorgis aŭ interesiĝis pri la famulo. Li staris sola antaŭ la fazanejo. Mi atente alproksimiĝis. Sed li volis "nur rigardi". Tial ni, post nur mallonga tempo, adiaŭis. Por ĉiam.

**Adreso de la aŭtoro**
*Dr. Wolfdietrich Kühme*
*Richter Gürtel 1*
*DE – 50735 – K ö l n* / Germanio

**Priaŭtora informo**

Zoologo. Scienca laboro ĉe Maksplankinstituto en Bavario/Germanio, 1963/64 en Serengetio, poste ĉe Zoologia Ĝardeno en *Köln*, Germanio.



# La homo kaj Naciaj Parkoj

*Hans-Friedemann* SACHS

## Enkonduko

Neniam ekzistis tiom multaj Naciaj Parkoj kiom nuntempe, neniam ili estis tiom necesaj kaj neniam antaŭe ili montris tiom grandajn nombrojn da vizitantoj. Tio precipe validas por Afriko. Naciaj Parkoj kaj similaj formoj de natur- kaj sovaĝbesta protektado evidente estas de grava signifo. Tiajn cirkonstancojn konsideras tiu ĉi artikolo por la "klasikaj regionoj de naciaj parkoj", nome Orienta Afriko. Tie oni ekkonis la gravecon de la instalado de naciaj parkoj en nia hodiaŭa vivoepoko. Ankaŭ la evoluigaj metodoj de naturprotektado, la sukcesa funkciigo de Naciaj Parkoj ne devas ĉesi – sed devas sin aranĝi kaj akordiĝi, vole aŭ nevole, al novaj faktoj, bedaŭrinde ne nur al biologiaj. Se en antaŭaj tempoj la idealo de nacia parko estis vidata en la absoluta netuŝateco de ia regiono kaj rigora protektado, la hodiaŭa protekta taktiko baziĝas sur realismaj kompromisoj.

La kreado de Naciaj Parkoj esence rezultas el la sento de respondeco konservi la restojn de iam multnombra kaj unika sovaĝbestaro por estontaj generacioj. Tio ne eblas per alta muro aŭ profunda foso ĉirkaŭ konvena sovaĝej-regiono por efika ŝirmado kontraŭ malbonaj kaj malutilaj influoj de ekstere. Tia statika koncepto cedis al dinamika koncepto – antaŭ ĉio pro la ekkono, ke ankaŭ Naciaj Parkoj kostas monon. Multege da mono.

Kontraŭ la ŝtelĉasistoj ekzemple oni povas batali nur per efika kontrolado helpe de bone ekipita kaj bone edukita gardisto-trupo. Edukado kaj ekipaĵo kostas. Celkonforma bestoprotektado en pli vasta senco povas ekzisti nur per preciza kono de la sovaĝbestaj populacioj – do, pere de intensa esplorado. Ambaŭ aktivadoj kostas monon. La plej granda malamika sinteno tamen estas la senintereso kaj indiferenteco de multaj homoj kontraŭ la ekzistado kaj graveco de la pluekzistado de la naturo kaj la bestaj kunvivuloj. Tial oni devas varbi por la ideo de ŝirmado de la naturaj faŭno kaj flaŭro. Oni devas fari

komprenebla por plej vastaj kaj multinfluaj rondoj la ideon de tiucelaj rimedoj kaj antaŭzorgoj. Ankaŭ tia varbado estas kosta. Tre kosta.

## Naciparka ekonomio

La plej grava financfonto por la necesaj monrimedoj estas la turistoj, precipe tiuj el pagipovaj landoj. Nur malmultaj el ili tamen klopodus viziti Afrikon, se tie ne troviĝus allogaj naciaj parkoj kun fascinaj sovaĝbestaroj. Bestomondo en grandioza ĉirkaŭaĵo prezentas por la koncernaj landoj pli signifan posedaĵon kaj kapitalon ol iu ajn alia agrikultura loka produkto (kafo, kotono, teo, sisalo k.t.p.). La rapide kreskanta turistaro do alportos plialtiĝantajn sumojn de alta nacia ekonomia signifo. Sed temas ne nur pri financa, sed ankaŭ pri ne pli malvalora idea kaj imaga profito: landoj kaj ties enloĝantoj, kiujn renkontas la turistoj, estos neforgeseble interplektitaj en la naturĝuon kaj vojaĝspertojn, kaj eĉ fariĝos portantoj de certa simpatio – faktoro, kiun oni ne povas prikalkuli sufiĉe alta por la tie ankoraŭ vivantaj endanĝeritaj indiĝenaj triboj.

## Iluzia bestoparadizo

Tamen alia idea asociado kaj pripenso trudas sin al la naturamanto kadre de la temo "Homo kaj Nacia Parko". La grandiozaj impresoj, kiuj imponas al la turisto dum la vojaĝo tra afrikaj "bestoparadizoj" enhavas – kiom paradokse tio sonas – ankaŭ certagradan danĝeron, nome la danĝeron de ĝeneraliĝo, la trotaksado. Ĉar tre facile venas en la kapon de ravita turisto, dum renkontiĝo kun la ekzotbesta mondo la iluzio, ke tiu besta abundo ekzistas en la tuta kontinento. Ankaŭ liaj amikoj, kiuj poste vidas la bestoriĉecon sur la memor-fotaĵoj, ofte inklinas rigardi la tutan Afrikon kiel unikan paradizon, gigantan rezervejon de sennombraj sovaĝaj bestoj. Ili tro senpripense forgesas, ke la vizititaj Naciaj Parkoj kaj rezervejoj estas nur fragmentoj, malgrandaj terpecoj, kvazaŭ trezorinsuloj en maro de malplenpafita kaj agrokulture malproduktiva cetera kontintento. Necesas laŭvice nombri, kie sovaĝbestaroj mortpafe maldensiĝis aŭ bestospecioj forpereis. La leganto de prisovaĝbestaj libroj kaj la spektanto de belegaj fotoj aŭ televid-elsendaĵoj nepre estu atentigata, ke temas pri modestaj eltiraĵoj, tre limigitaj geografiaj sekcioj de Afriko, en kiuj ankoraŭ ekzistas bestoj en tia riĉa varieco kaj intimeco – ĉar tie mankas la precipa malamiko de ĉiu alispeca vivaĵo, la pafilarmita pafema homo.



Tiuj malgrandaj fragmentoj jam atingas certagradan similecon (kiel ekz. la Najroba Nacia Parko en Kenjo, kiu estas – en la direkto al la urbo – sekurigata per ferkrada latiso) kun zoologia ĝardeno. Tiun fakton daŭre demonstri, jen sublime jen troige, celas mia kontribuo por tiu ĉi sciencrevua kajero honore al profesoro *Bernhard Grzimek*.

## Jen junulo, jen eminentulo

Dum sia vizito en Afriko en la jaro 1964, prof. *Grzimek* certe observis min – tiam 7-jaraĝan knabon – nur "iom distance". Ankaŭ mi konservis grandrespektan distancon al tiom fama eminentulo. Sed mi scias, ke li ankoraŭ en 1981 – do preskaŭ 17 jarojn poste – bone memoris la mallongan renkontiĝon kun la tiama junulo meze de Serengetio. Ĉu estis la du mordemaj striitaj mungotoj en miaj brakoj, kiujn mi fiere prezentis al li? Ĉu la orfa zebrido kun la kol-vundo, kiun ni savis el ŝtelĉasista drat-kaptilo? Ĉu la nana antilopobebo, kies gambojn poste leopardo predo-avide eltiris el la kaĝo?


Tiaj malmultvortaj informoj evidente postrestis en la kapo de la altstatura profesoro, aliflanke li ja ne skribus en sia libro "Fine pri homoj" ("*Auf den Menschen gekommen*", 1974, ISBN 3-453-00672-0, p.476): "… ĉu la *Sachs*-infanoj, post jaroj, rememoros tiun fruan junaĝon en la sovaĝejo inter elefantoj kaj ĝirafoj?" Montriĝis lia "koro por bestoj", eco de vera naturprotektanto. Kiu amas bestojn kaj plantojn, tiu ankaŭ amas homojn – kaj, precipe, kapablas pritaksi sin mem. Malreligiaj, monavidaj aŭ burokrataj homoj havas problemojn en la sovaĝejo kaj en la korpreme maltrankvila sankteco de malluma praarbaro. Ili timas la naturon, kiun ili neniam vere sentas proprakorpe, propraanime.

Ekzistas ankaŭ sciencistoj, kiuj rigardas la naturon senescepte kiel "esplorendan objekton". Tiaj falsaj profetoj en blanka sciencmantelo, kiuj serĉas la paradizon en arte faritaj mondoj, detruas la naturan Edenan ĝardenon. Profesoro Gĵimek' sciis, ke la vera paradizo troviĝas en la surtera naturo, nenie aliloke. Tio estas naturproksima pensmaniero, pli funda ol kelkaj religiaj konfesoj sen la natur-amo apartenanta al tiu.


En tiu ĉi jaro de la gĵimeka centjariĝo, 22 jarojn post lia morto en 1987, mi estas 52-jaraĝa. Simile kiel prof. Gĵimek' mi dediĉis mian vivon al naturprotektado, laboris kiel forstisto en Afriko kaj ekde 2006 kiel konsilanto por konservado de la naturo kaj protektado de endanĝerigitaj bestospecioj kaj indiĝenkulturoj. La nomo "*Grzimek*"

simbolas ekzemplodonan tutmondan naturprotektadon. Tiu homo ne nur estis kuraĝa, prizorga, praktika kaj politika pledanto por la naturo, sed li ludis sian rolon kiel antaŭen puŝanta fakulo en la naturprotektado kun konsidero kaj necedemo, tiuĉirilate ne kompromispreta ĝis sia morto.

Profesoro Gĵimek' sendube havis ekzemplan funkcion por junaj homoj kaj naturamikoj. Kiel oni pli efike povas batali por la naturo ol disvastigante liajn mesaĝon kaj imponan scion tre homan kaj profundpensan, kompreneblan, per praktika ekzemplo? Li montris, ke la naturprotektado bezonas zoojn kaj bestoĝardenojn, ĉu oni ŝatas aŭ malŝatas tion, sed ke konservado speciale devas esti praktikata en lokoj, kie homa aktiveco endanĝerigas ĝian pluekzistadon. *Bernhard Grzimek* alportis la bestoprotektadon en la mondon kiel grandsignifa mondcivitano.



Por 7-jaraĝa knabo la vivo en Serengetio estas plena de fotoekscitoj – –




– – precipe kiam d-ro *George Schaller* (bildo) orelmarkas kaj paĉjo prenas sangospecimenon de narkotita plenkreska leonomasklo.

Kiam ĵurnalisto iam demandis la besto-profesoron: “Kiu historia persono vi ŝatus esti?“ venis la seka respondo de Gĵimeko: “Buddho“. Sen pluaj klarigoj. Jam pro tiu ĉi respondo mi rigardas lin dediĉita mondcivitano, kiu pensis ne nur pri Okcidento sed ankaŭ pri Oriento. La respondo estas konkreta mesaĝo pri egalanimeco kaj sciado – ankaŭ se aliuloj interpretis tion kiel orgojlon, mondfremdecon kaj arogantecon. Se homo estas konvinkita pri bona kaj grava ideo, li tamen devas kalkuli kun multe da diversflankaj kontraŭstaroj kaj rezistoj. La aktiva naturprotektado estas, spite de sia urĝeco, ne tre populara. Pro tio *Grzimek* ne estis elektita inter “la cent plej famaj germanoj“ en la samtitola libro de *G. Knoop & V. Arens*, *Econ* 2007, ISBN 3-430-15521-5. Kiuj estas tiuj kontraŭuloj?



La mesaĝo de Gĵimek' entenas grandan respekton antaŭ la vivo kaj la naturo. Li komunikis ties esencon kaj verajn ĉefaĵojn kaj postlasis multajn librojn pri bestoj kaj homoj – plenajn de ekzemploj pri kreiva helpopreteco por aktuala, tutmonda kaj celkonscia naturprotektado, sed ankaŭ de ŝanĝiĝoj de la naturo pro homa influo. La polusaj ursoj perdas siajn vivospacojn, la plej alta monto en Afriko, Kilimanĝaro, perdas sian neĝoblankan ĉapelon – detruaj evoluoj, kiujn la homo ne plu kapablas korekti aŭ malfari. La stoika senemocieco de Gĵimek' kaj lia televideca rideto ne trompu nin pri lia mesaĝo, ke ne nur Serengetio sed ankaŭ nia bela multkolora mondo plena de diversaj kreaĵoj “nepre ne mortu“.



Tiu ĉi gnuo estis buĉita de ŝtelĉasistoj per lancopiko en la dorson, sed ne por viando, sed nur por fortranĉi la voston – kiu servas kiel “muŝbatilo“ (aŭ prefere kiel statusosimbolo de kelkaj afrikaj eminentuloj, kiel ekz. *Yomo Kenyatta*, iama prezidento de Kenjo – dum lia “edzina moŝto“ riĉiĝis pro negocado kun la eburaj dentegoj de ŝtelĉasitaj elefantoj).

Serengetio prezentas tutmonde unikan ekosistemon. Impresas ne nur la preskaŭ senlima savano aŭ la vulkaneco de la Ngorongoro-protektejo – en Serengetio okazas unu el la lastaj grandaj sovaĝbestaj migradoj. Ĉiujare centmiloj da gnuoj, zebroj kaj antilopoj entreprenas siajn cirkloforman marŝadon inter la Masajmara rivero kaj la Ngorongoro-kratero, kie ankoraŭ vivas grandaj aroj da leonoj, gepardoj, ĝirafoj, bubaloj, elefantoj, hienoj, fakoĉeroj. Pro troloĝado, ŝtelĉasado kaj aliaj homaj influoj tiu ĉi sovaĝbesta paradizo tamen estas en danĝero de pereo. Bernardo Gĵimek' jam en la 1950-aj jaroj ekkonis tiun minacon por la grandaj sovaĝej-regionoj en Afriko kaj ties faŭno. Li komencis publike akuzi la detruon de la naturo – viziisto jam en tempo, kiam nur malmulte da signifo estis atribuita al naturprotektado.



Ĵus kaptita ŝtelĉasisto en mankatenoj kun pafarko kaj venenitaj sagoj

Pro sia laboro en Serengetio kaj la filmo "Serengetio nepre ne mortu", kiu en la jaro 1959 ricevis Oskar-honoron, Gĵimeko sukcesis enmeti en la konsciencon de la mondopubliko, ke la situacio ne nur en Serengetio sed en la tuta Afriko kaj aliaj kontinentoj estas minacata kaj bezonas protekton. Kun rimedoj de la mondonackonto "Helpo por la minacata faŭno" fondita de li en 1962, li jam tiam komencis subteni naturprotektajn projektojn en Afriko kaj aliaj kontinentoj. Kaj li bone sciis, ke sukcesa naturprotektado necesigas monon. Kaj li bone sciis, kiel varbi por donacoj.

Sed mono ne estas ĉio en la kadro de naturkonservado. La sovaĝbestaj rezervejoj ofte situas en politike malkvietaj regionoj kaj estas ĉio alia ol invitemaj por sciencistoj. Nesupervidebla nombro da ribelulaj grupoj, mallojalaj soldatoj kaj banditoj igas limregionojn malsekuraj kaj tute ne sendanĝeraj. Tion mi spertis dum mia laboro kiel forstisto en Burundo, kaj tio estas tre konata fakto en kaj ĉirkaŭ la lastaj rezervejoj de la pluvarbaraj montogoriloj. Aldoniĝas lokaj mitoj de fuĝintoj, kiuj maltrankviligas sciencistojn en iliaj esplorlaboroj.



La naturaj resursoj de arbaroj kaj savanoj ja estas la kapitalo por la tie vivantaj homoj. Se oni neniigas tiajn naturajn resursojn cele de mallongdaŭra agrokultura utiligado, baldaŭ poste mankos la longdaŭra bazo por pli bona estonto. Tio validas ne nur por la vivoregiono de goriloj en la montoarbaroj de la trilanda angulo ĉe Kongo, Ruando kaj Ugando, sed ankaŭ por la orangutanoj en Indonezio, kies vivospaco pli kaj pli malgrandiĝas pro la senĉesa senarbigo de la terkultivanta loĝantaro.

### Naturprotektado laŭspure de Gĵimeko

Kio iam komenciĝis per "Serengetio nepre ne mortu", tio estas hodiaŭ internacia programo kun jarbuĝeto de ĉ. 30 milionoj da eŭroj. En 30 landoj subtenas la Zoologia Societo Frankfurto projektojn por la protektado de minacataj bestospecioj, medioj, vivospacoj kaj biotopoj, kiuj estas en danĝero forperei.

Malantaŭ ĉiu projekto staras homoj, kiuj – ofte kun alta persona risko – laboras por tio, al kio ili firme kredas. Ili estas konvinkitaj, ke ili povas iom plibonigi la mondon per propra engaĝiĝo kaj aktivaj faroj – por ke ankaŭ niaj genepoj kaj posteuloj povu sperti kaj vidi sovaĝbestojn, vivantajn en la libera naturo sub libera ĉielo sen latiso kaj ĉirkaŭbaraj palisaroj sur nedetruita grundo.

Por ke ekzistu ankaŭ estonte grandaj, vastaj sovaĝejaj areoj.

Por ke la biologia diverseco estu konservata sur nia planedo. Kaj la plej brila ekzemplo estas la Nacia Parko Serengetio en la orientafrika Tanzanio.

### Adreso de la aŭtoro

*Hans F. SACHS*
*B.P. 31*
*Popinguine* / SENEGALO

<hans.sachs@sahel-vert.org>

### Priaŭtora informo

La aŭtoro naskiĝis (1957) en Namibio. Li studis biologion ĉe la Universitato *Monrovia*/Liberio (1980) kaj poste forstsciencon ĉe la Universitato *Göttingen*/Germanio. Post laboroj en Senegalo, Ruando-Burundo kaj Kameruno li nun estras agrokultur-forstan projekton en Senegalo.